



INTERVJUO DE BELA MARO (Lại Thị Hải Lý)
(la 30-a de aprilo 2013)

- *Saluton, kara Bela Maro! Vi partoprenis ĉi-monate la 7-an Azian Kongreson. Ĉu vi povas kundividi kun ni viajn impresojn pri la kongreso?*

- Mi estas el Vjetnamio, unu el 26 landoj kiuj partoprenis la Azian Kongreson en Israelo. Mi havas tre fortan impreson pri via lando kaj kongreso. Dum la kongreso, ni renkontis la vicurbestron de Jerusalemo. Li venis por saluti nin. Ni tre ĝuis la tutan kongreson. Vespere ni kune dancis kaj ĉeestis la koncerton de Kajto kaj Jomo; dum la tago ni vizitis multajn mirindaĵojn en Jerusalemo. La prelegoj de la kongreso estis tre interesaj.

- *Unu el tiuj prelegoj vi mem prezentis. Pri kio ĝi temis?*

- Pri la infana edukado. Kaj mi ricevis multajn aplaŭdojn de vi... Mi volas danki vin ĉiujn, kiuj partoprenis.

- *Krom la prelegoj kaj ekskursoj, kiujn aliajn programojn vi partoprenis?*

- Mi ankaŭ rigardis la artan programon en la kongresejo. Mi tre ŝatis la eŭritmon de la danca grupo. Multan dankon!

- *Kiel vi pasigis la tempon post la kongreso?*

- Mi restis post la kongreso. Kune kun ĉirkaŭ 30 partoprenintoj, mi vojaĝis ĉirkaŭ via lando. Mi fakte iris al Jordanio kaj ankaŭ al Elat kaj Morta Maro. Mi tre ŝatas la maron. Mi mem nomiĝas Bela Maro, pro tio mi tre ŝatas maron. En Israelo mi vidis 3 el la plej belaj maroj en la mondo.

- *Do, vi renkontiĝis kun Mediterano, la Morta Maro kaj la Ruĝa Maro. Kiun el tiuj maroj vi pleje ŝatis?*

- La plej ŝatata por mi estas la Ruĝa Maro. Mi estis en la Ruĝa Maro, kvankam mi ne naĝas. Sed per la helpo de kongresanoj, mi jam sukcesis naĝi! Mi metis mian vizaĝon sub akvon kaj povis vidi multegajn fiŝojn ĉirkaŭ mi! Ege bela kaj nekredbla maro! Mi deziras reveni por ĉeesti en tiu bela maro.

- *Ĉu la post-kongresaj ekskursoj jam finiĝis?*

- Jes. Kaj mi ankoraŭ restas en Israelo dum 5 tagoj, por mia hobbio kaj por mia laboro. Mi fakte laboras en la infana edukadkampo. En Vjetnamio mi havas “instituton pri superknaboj”, kaj mi ankaŭ havas unu belegan infanĝardenon.

- *Kion vi povas rakonti pri via laboro?*

- Mia infanĝardeno estas bela kaj moderna kaj sukcesa. Venante al via lando mi kunportis multajn diskojn kaj mi disdonis ilin al multaj geamikoj el 26 landoj. Per la helpo de multaj esperantistoj, mi jam vizitis unu infanĝardenon en Modiin, kaj hodiaŭ mi vizitis infanĝardenon apud Tel-Avivo (ŝtata infanĝardeno). Kaj tie mi estis kun infanoj (ĉirkaŭ 33 infanoj). Ili estis ĉirkaŭ mi; ni kune kantis, kune parolis pri mia lando Vjetnamio... (Estas la lando tre for de Israelo...) Kaj mi ankaŭ parolis pri Esperanto, ĉar infanoj tie ne sciis kio estas Esperanto. Kaj mi kaj s-ino Luiza interparolis kun ili pri Esperanto, la plej facila lingvo en la mondo. Ni kune lernigis infanojn kiel diri “saluton!”, kiel diri “dankon!”... Ĉi-vespere mi revenos al Jerusalemo por viziti unu alian infanĝardenon, per la helpo de s-ro Lauren. Kaj mi ankaŭ deziras viziti universitaton en Jerusalemo. Do mi ĝuas ĉiun tagon en via lando, kaj mem via lando jam metis en mian koron tre varman sentimenton. Mi pensas, ke mi ege sopiros je vi. Mi esperas, ke mi baldaŭ revenos por ĉeesti en la belaj maroj kaj esti kun multaj geamikoj, kaj ankaŭ por la infana edukado. Do, dankegon al vi, kaj ĝis tre baldaŭ.

- *Ni atendos vin denove, kun granda amo. Dankon kaj ĝis revido.*

(Intervjuis: Luiza CAROL)